La 4-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) en Kameoka, Kioto, Japanio

Dato: la 7a – 10a de oktobro, 2014

Loko: OOMOTO-centro, Kameoka, Kioto, Japanio

Ĉeftemo: Kapabligo de instruistoj/ gvidantoj por bona gvidado

Ĉeforganizanto: Japana sekcio de ILEI

Kunorganizantoj: Ĉina kaj Korea sekcioj de ILEI kaj Stud-eduka Fako de Japana Esperanto-Instituto

Kotizo (inkluzive de manĝoj kaj tranoktoj): (pagu surloke)
Aliĝo el ekster Japanio: 10,000 JPY (70 EUR)
Aliĝo el Japanio: 13,000 JPY
Ekskurso al Kioto: 6,000 JPY (inkluzivas tagmanĝon)



Kiel atingi la seminariejon:

Al la Oomoto-centro 10 minutojn piede de la stacio Kameoka. Al la stacio Kameoka vi veturu per JR-linio San'in-honsen de la stacio Kioto ĉ. 30 minutojn. La kosto estas ĉ. 400JPY.

■De la flughaveno Kansai
①Per JR-linio Kankuu-kaisoku al la stacio Oosaka ĉirkaŭ 1 horon.
②Per JR-linio Tōkaidō/San'yō al la stacio Kioto ĉirkaŭ 30 minutojn.
③Per JR-linio San'in-honsen al la stacio Kameoka ĉirkaŭ 30 minutojn. Entute kostas ĉirkaŭ 2000JPY.

■De la stacio Tokio
①Per JR-linio Sinkansen al la stacio Kioto ĉirkaŭ 2 horojn kaj 30 minutojn.
②Per JR-linio San'in-honsen al la stacio Kameoka ĉirkaŭ 30 minutojn. Entute kostas ĉirkaŭ 14000JPY.

Kontaktu:

ISIKAWA Tieko/ILEI-JP ĉe isksanjo@ff.e-mansion.com

Seminarioj/prelegoj:

Siajn proponojn por prelego, prezentado de modelleciono, metiejo ks. kun titolo kaj maksimume 200-vorta resumo, bonvolu sendi al ĉeforganizanto, ISIKAWA Tieko ĉe isksanjo@ff.e-mansion.com. Ni interŝanĝu ideojn pri sukcesa/malsukcesa instruado kaj bonaj lecionoj. Kadre de "seminarioj" okazos tiaj aranĝoj, kaj poste sekvos diskutoj.

Speciala prelego:

Prof. KIMURA Goro Christoph, Fakultato por fremdaj lingvoj kaj studoj, Sophia-Universitato Tokio prelegos “Kiel Esperanton en Orienta Azio instrui?” --Esperanto en Eŭropo originas. Ĝis hodiaŭ, kaj gramatikaj priskriboj kaj instruiloj kaj instrukonceptoj ofte de tie devenas. Sed ĉu tiuj ĉiam por orient-aziaj bezonoj taŭgas? Ni kune pri la specialaj defioj instrui Esperanton en nia mondparto pripensu kaj diskutu.—

Ekskurso al Kioto:

Ni nun planas tuttagan ekskurson al Kioto, malnova urbo kun la historio de pli ol 1200 jaroj. Vizito al kelkaj vidindaĵoj kaj komuna tagmanĝo kostas 6000 JPY.
(partopreno libervola)

Provizora Programo

La 7-a de oktobro (mardo)	
15:00	Malfermo
16:00-18:00	Seminario 1, Seminario 2
18:00-19:00	Vespermanĝo
20:00-21:30	Interkona vespero

La 8-a de oktobro (merkredo)	
09:00-12:00	Seminario 3, Te-paŭzo, Seminario 4
12:00-13:00	Tagmanĝo
13:30-17:30	Duontaga ekskurso en Oomoto-centro kaj la urbo
18:00-19:00	Vespermanĝo
19:00-20:30	Seminario 5
21:00-	Libera kunveno

La 9-a de oktobro (ĵaŭdo)	
09:00-12:00	Seminario 6, Te-paŭso, Seminario 7
12:00-13:00	Tagmanĝo
13:00-17:30	Speciala prelego de Prof. KIMURA Goro Christoph, Te-paŭzo, Seminario 8
18:00-19:00	Vespermanĝo
19:00-	Libera kunveno

La 10-a de oktobro (vendredo)	
09:00-17:30	Ekskurso al Kioto
18:00-19:00	Vespermanĝo
20:00-21:00	Fermo

La 11-a de oktobro (sabato)	
08:00	Foriro al la 101a Japana Esperanto-Kongreso en Obama